MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 7-8

JULIO+AŬGUSTO 2020 Kol. 423/36

xxxx

povos aĉeti kun rabato 1100 Kč, ambaŭkaze plus veraj sendokostoj. Cetere, tio estas daŭra praktiko de KAVA-PECH, ke la ĉeĥaj organizitaj esperantistoj povas aĉetadi la librojn en Esperanto rabatite. La kompletan oferton bonvolu rigardi ĉe https://kava-pech.cz.



El alia poto: Mi volas aldoni plian informon por tiuj, kiuj bedaŭras, ke jam longe ne plu aĉeteblas la kvarlingva libro de **Pavel Rak** Kreslený humor / Desegnita humuro / Cartoon humour / Humor mit dem Zeichenstift. Mi jam interkonsentis kun la aŭtoro, ke mi eldonos la duan eldonon omaĝe al lia pasintjara okdekjariĝo. Ĝi estos kompletigita pri pluraj liaj novaj desegnaĵoj: Kaj humuraj, kaj pripensigaj. Espereble ni sukcesos aperigi ĝin ankoraŭ ĉi-somere.

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Sub la suno de Tours

Augustin Mouchot (1825-1912), profesoro pri matematiko en la Descartes Liceo, inventis la unuan sunan motoron de la historio.

Prilumado pri tiu genia viziulo maljuste forgesita.

Videbla ĉe la n-ro 4, strato Bernard Palissy, la dediĉo estas modesta: «A. Mouchot konstruis en tiu domo de 1864 ĝis 1866, la unuan aparaton por uzi la sunan varmon». Augustin, komplete skribita, pli bone honorus sian solenan antaŭdestinon, ĉar Augustin rilatas al la suna aŭgusta monato, kiu mem devenas el la latino Augustus, omaĝo al unu el la plej brilaj romiaj

imperiestroj: Aŭgusto. Alveninta en 1864 al la imperia liceo de Tours (ĝi iĝos Descartes liceo en 1888), Mouchot, naskita en Côte d'Or (departemento 21), estas tiu homo, kiu, 2 jarojn poste, prezentos sian inventaĵon al alia imperiestro: Napoleono la Tria. Lia «maŝino», suna generatoro, kiel klarigita de li, konsistis: «el metala spegulo kun linia fokuso, el nigrigita kaldronego, kies akso koincidas kun tiu fokuso, el vitra kovraĵo lasanta alveni la sunradiojn ĝis la hejtkaldrono, sed malpermesanta ilian eliron, tuj post kiam tiu transformis ilin en obskurajn radiojn».

La obskura flanko de la *Forto*

La inĝeniero Charles Bontemps rememorigis en 1878 pri la defioj de tiu maŝino: «Ne sufiĉas al la aktivo de nia epoko disvastigi la penson per la telegrafo kaj la gazetaro, ligi la homojn per la vojaĝoj: nova problemo sin trudas, por kiu solvoj abundas; ni volas paroli pri la difuziĝo de la forto». Kaj tiu forto, «mistero, kiun la filozofio ne klarigis kaj kiun la fiziko studas, riveliĝas al ni en tuŝebla formo: la laboro». Venta, tajda, suna fortoj!

Kaj ja la sunon Mouchot volis «laborigi», ĉar por li gravis «iel bremsi tiun ruinigan forton kaj fari ĝin por la homa specio, anstataŭ plago, unu el la potencaj helpantoj». La scienculo, evidente, sciis ĉion pri siaj antaŭuloj ekde Eŭklido (300 a.K.). Ni citu unuflanke Arkimedon, kies «ardaj speguloj» verŝajne flamigis la romian ŝiparon sieĝantan Sirakuzon, kaj aliflanke Leonardon da Vinĉi, kiu imagis en 1515 la ideon de suna koncentrilo. Allogite sub tiun «sunon de Turlando», kie Leonardo da Vinĉi mortis, Mouchot, kun fandiĝema nomo,

baldaŭ ekkrios: «Eureka!», influita ankaŭ de René Kartezio, regiona infano, kiun li rigardas kiel «la plej brilan kaj puran el niaj naciaj gloruloj».

Francio devancas la Usonanojn

La usona inĝeniero John Ericsson konstruis maŝinon kompareblan kun tiu de la Franco. Tio okazis en 1868. «Nu, argumentis Mouchot, se oni bonvolas memori, ke ekde 1866, mi jam havis 2 malgrandajn vapor-maŝinojn fukciantajn per la suno de Tours, oni des malpli kontestos mian meriton esti antaŭiĝinta al la famkonata usona inĝeniero, ke mi neniam kaŝis al iu miajn eksperimentojn». Efektive, en Tours, la homo publike boligis akvon kaj li eĉ ellaboris bonegan boligitan bovaĵon per suna energio.



La kuirado estis perfekta, kaj la Turanoj atentaj pri sciencoj kaj gastronomio aplaŭdis tiun «novan Prometeon». Malpli apetito-veke, Mouchot fandis stanon, kupron, zinkon kaj eĉ sukcesis funkciigi pumpileton. Lia fameco atingis la zeniton dum la Universala Ekspozicio de 1878. Lia suna generatoro, 5 metrojn diametra, ekzaltis la gazetaron: oni legis: «Nova erao de riĉeco kaj de civilizacio malfermiĝas por la landoj bruligataj de la suno, tiaj, kiaj estas Alĝerio kaj Egiptio ekzemple, kie la suna generatoro povos disvolvi la agrikulturon same kiel la industrion ».

Krepusko

Ne eĉ Maurice de Taste, kreinto de la franca meteologio kaj kolego de Mouchot en la liceo de Tours, povintus antaŭvidi, ke «nigra nubo» fuŝos la energian revolucion, kiu ŝajnis profiliĝi. Pro la malkovro de karbaj minoj en la orienta Francio kaj la pliboniĝo de la fervoja reto faciliganta ĝian reprovizon, la eksplodmotoroj kaj la mondskale grandkvanta petroluzado mergis baldaŭ Mouchot en la plenan nigron de la Historio… Lia lasta rimarkinda ago estis, en 1882, la prezentado ĉe la Tuileries Ĝardeno (Parizo), de presmaŝino funkcianta dank' al la suna energio, kiu eltiris 500 ekzemplerojn de gazeto titolita La Suno.

Estis en aŭgusto, do kiel Aŭgusto, sed ne kiel Augustin, kiu sola forpasis en la plej granda mizero, 87-jaraĝa, kun sia Medalo de la Honora Legio ie proksima de si. En La Recherche de l'Absolu (Serĉado de Absoluteco), Balzac, lia samtempulo, skribis: «La gloro estas la suno de la mortintoj, en via vivo, vi estos malfeliĉa, kiel ĉio, kio estis granda». Augustin Mouchot estis granda.

La lasta averto

En sia libro presita en Tours en 1869, Mouchot avertis: «Kiam oni pensas pri la enorma karbokonsumado, kiu estas farata ĉiu jare en la mondo, ĉar en Francio, ekzemple, ĉiu grava fervoja linio bruligas pli ol 1000 tunojn da karbo tage, oni ne povas reteni sin konkludi, ke prudentas kaj saĝas ne ekdormi tiurilate en trompa sekureco».

La libro: „La Chaleur et ses applications industrielles", 1869, imprimerie Mazereau.

La varmeco kaj ĝiaj industriaj aplikoj, 1869, presejo Mazereau.

Artikolo eltirita el la Tours Magazine de Julio kaj Aŭgusto 2019 kaj esperantigita de Gérard kaj Jeannine Layseman.

MONDOJ KAJ MALKOVRINTOJ - Scott Kelly pri spertoj en la kosmo (traduko el lia libro "Eltenkapablo. Mia jaro en la kosmo.")



La usona astronomo Scott Kelly pasigis entute 520 tagojn en la kosmo, sur la internacia kosmostacio ISS kaj en la kosmopramo Discovery. En la sekva teksto li rakontas pri siaj malkovraĵoj.

„Mi lernis, ke nenio estas tiel mirinda kiel akvo. Kiam mia aviadilo nokte surteriĝis en Hustono kaj mi fine povis iri hejmen, mi faris ĝuste tion, kion mi anoncis dum la tuta tempo: mi paŝis tra la dompordo, iris tra la malantaŭa pordo eksteren kaj saltis, kun mia aviadila kostumo ankoraŭ sur la korpo, en mian naĝbasenon. La sento post jaro je la unua fojo plonĝi en la akvo, tute ne lasas priskribi sin. Mi neniam plu rigardos akvon memkompreneblaĵo. (…)
Ŝajnas al mi, ke mi havas intiman scion pri la tero, kiu estas barita al la plej multaj homoj – bordaj linioj, terenoj, montoj kaj riveroj. Kelkaj partoj de la tero, precipe Azio, aperas pro la aer-

poluado tiel difuzaj, ke ili aspektas malsanaj, kvazaŭ ili bezonus kuracistan traktadon aŭ almenaŭ okazon ripozi. La konturo de nia atmosfero je la horizonto montriĝas tiel minca kiel kontakt-lenso sur la okulo, kaj ĝia delikateco ŝajnas postuli nian protekton.“*

** el la libro de Scott Kelly: Eltenkapablo. Mia jaro en la kosmo. C.Bertelsmann, Munkeno 2018*

(trovita en la blogo de Hans Georg-Kaiser sub blogger.com)

Fino bona - ĉio bona.

Antaŭ pli ol dek du jaroj iu E-klubano donis al mi paperfolion kun kalendaro, kie estis elpresita mallonga rakonto de (por mi nekonata) Max Kašparů. La rakonto estis tre bela, tiom sprita, ke mi decidiĝis traduki ĝin kaj prezenti ĝin en mia Ipernity - paĝo sub la titolo „Kiel mi iĝis belaspektulo“. Mi eĉ ne pripensis, ke tiu aŭtoro vivas, do mi ne petis permeson. (Sufiĉis malfermi interreton!).



Post tri jaroj mi veturis al Skokovy, kie okazis nia regula lingva seminario. Kompreneble mi multajn partoprenantojn tuj ekkonis, ni reciproke salutis nin, kelkajn mi ĉirkaŭbrakumis, eĉ laŭ kutimo kisis. Sed estis tie ankaŭ preskaŭ samaĝa barbulo, kiun mi ne konis. Liaj okuloj post okulvitroj brilis kaj iom ridis (eble jam ricevis informon). „Mi estas Pavel“ kaj mi proponis manon al la saluto. Li premis mian manon kaj memprezentiĝis: „Mi estas tiu belaspektulo“… Mi restis trafita kiel per fulmo, tiam mi volis esti kelkajn metrojn sub la tero, mi ege hontis. Mi multfoje senkulpigis min kaj klopodis klarigi mian kulpon. Tiam li montris, kiel kondutas

viro, tre klera, inteligenta, kun la plej granda kvanto da akademiaj titoloj. „Ne gravas, neniu problemo“ li diris! Poste, dum la tuta vespero, ni interparolis, babilis kaj la „aferon“ ni fermis. Kaj pri tiom da akademiaj titoloj Max klarigis: „Ekde la naskiĝo mi studas…“. Kiel la signon de pardono li donacis al mi broŝureton de rakontoj el medicina medio, kies aŭtoro estis li mem. Eĉ kun donacet-vortoj kaj subskribo. Tiel agas vera inteligentulo.

De tiam ni kelkfoje renkontiĝis kaj kun rido ni reciproke „prezentiĝas“ kiel belaspektuloj. De tempo al tempo ni salutas nin pere de komputilaj mesaĝoj – kiel amikoj. Dankon al vi, Max.

Pavel Nechvíle

La forto de rido

Ĝi kapablas forigi eĉ nesupereblajn barierojn inter homoj kaj konstrui amikajn kaj amajn rilatojn. Ĝi liberigas streson kaj per tio plibonigas ankaŭ la imunecon. Ĝi ankaŭ helpas ĉe terapio kaj saniĝo.

Estas multe da kialoj, kial estas necese plej ofte ridi eĉ ridegi! Neniu el ni bezonas ĝin lerni. Jam novnaskitoj konas tiun ĉi specifan simptomon, kvankam ĝi estas ĉe ili nur reflekso: ĝi aperas sur ilia vizaĝo sen interna kialo. Tiu vera rideto, kiun ĉiuj gepatroj atendas kaj pri kiu ili poste jubilas, venadas jam en la tria semajnoj de la vivo, la bebo tiel reagas je ies ĉeesto, voĉo aŭ objekto. Kaj en la tria, kvara monatoj ridas la bebo laŭte al la proksimaj vizaĝoj. Ĝi jam komprenas, ke ĝia rideto alvokas pozitivan reagon kaj ke ridi estas la plej bone. Sed kiel ni maljuniĝas, tiel ni iĝas pli kaj pli seriozaj kaj ni forgesas ĉion, pri kio ni kiel infanetoj ridis kaj kion ni kiel infanoj pri la rido

sciis. Statistiko diras, ke infanoj ridas 400x tage, sed plenkreskuloj meznombre nur 20x, la pli feliĉaj 40-50x tage. Solida diferenco!

El la gazeto Květy tradukis J. Rýznarová

Lernado de pacienco kaj humileco

Kuŝante surdorse jam la trian semajnon mi strebis rememori la momenton, kiu tiel abrupte ŝanĝis miajn planojn, kaj ĝis nun mi ne povas decidiĝi, ĉu mi sentu pli da malfeliĉo aŭ pli da feliĉo. Mi preskaŭ ne rajtis moviĝi; sed povintus esti multe pli malbone.

Ke mi dum la belega vetero de la paska dimanĉa posttagmezo aerplenigis la aertubojn de mia biciklo kaj startigis la unuan fojon post proksimume kvar jaroj la aktivadon, kiun mi ĉiam ŝatis, estas certe kompreneble. Kaj mi vere ĝuis la veturadon sur la biciklopado de Dobřichovice al la praga urboparto Radotín,

pli kaj pli rapidigante kaj en mia interno fierante, ke mi denove povas. Kvazaŭ junulo! Proksimume duonvoje mi rigardis kun intereso dekstren trans la riveron Berounka kaj admiris tie paŝtiĝantajn ĉevalojn. Sed ho ve!!! Post la rerigardo antaŭen mi ekvidis antaŭ mi starantan debicikliĝintan virinon, kaj estis klare, ke la karambolo estas neevitebla. Por ne kolizii kun ŝi, mi krom bremsado subite rektangule ŝanĝis la direkton kaj maldekstren kaj dekstren, kaj jam mia korpo ekflugis tra la aero.

Kuŝante en doloroj surtere mi klare rememoris, kiel mi hejme antaŭ la ekvojaĝo decidiĝis, ke mi planas veturi nur sur la biciklopado, ne surŝosee, do pro manko de danĝero ne necesas surmeti kaskon. Sed nun kuŝante surtere mi konstatis, ke kasko tamen troviĝas sur mia kapo. Mi ne havas alian klarigon, ol ke mia gardanĝelo surkapigis ĝin al mi por savi mian vivon, ĉar mi kuŝis per la kapo sur la betonrando inter la asfalta biciklista vojo kaj herbejo.

Ambulanco, malsanulejo, covid-19-kontrolo, rentgena esploro, fine verdikto: tre komplika rompiĝo de la brako, vundita kubuto kaj rompita femurkolo en kokso.

Atendante komplikan operacion de la brako mi devis solvi la ricevitan demandon rilate al la femurkolo. Ĉar ĝi estis rompita, tamen la kontaktpartoj ne ŝoviĝis flanken, mi povis esprimi mian preferon, ĉu provi atendi, ĉu la rompitaĵo kunkreskos (min. ok semajnojn, sen garantio), aŭ post la operacio de la brako subiĝi al dua, nome la enmeto de artefarita kokso.
La operacio de la brako daŭris pli ol kvar horojn kaj post preskaŭ kvinhora kompleta anestezo mi sentis min tre malkomforte. Eble pro tio mi decidiĝis prefere lerni paciencon kaj esperi, ke la rompitaĵo en la kokso kunkreskos.
Dum la kuŝado mi havis sufiĉe da tempo por cerbumi ne nur pri la nuna stato, sed ankaŭ pri ĝia kaŭzo kaj pri mia ĝisnuna kaj venonta vivo. Kaj kiel eterna optimisto, kiu ĉiam ĉe ĉio serĉas pozitivajn trajtojn, mi trovis plurajn pozitivaĵojn ankaŭ ĉi-kaze.

Unue, mi vivas, kio ne devus esti, se mi ne surhavus la kaskon. Due, vundita estas la maldekstra flanko de mia korpo, do ekde la kvara semajno mi jam povis uzi la komputilon kaj labori, kion mi per la maldekstra mano apenaŭ sukcesus. Trie, mia poŝtelefono restis nedamaĝita, do eĉ kuŝante surdorse mi povis resti telefone (kaj kun limigoj ankaŭ rete) en kontakto kun miaj amikoj kaj labor-partneroj. Kaj plie, mi eksciis, ke danke al miaj perfektaj amikoj kaj kolegoj mia eldonejo povas funkcii ankaŭ sen mi. Kiel burĝo mi do maldiligentis enlite, kaj telefone disdonadis ordonojn, kiu kion faru! Tiel estis laŭplane transdonitaj en presejojn la datenoj por du novaĵoj en la ĉeĥa, danke al Jindřich Košťálek (al kiu mi pro tio publike dankas) estis ekspedita stoko da novaj libroj al Belgio, kiuj estis dume finproduktitaj por Flandra Esperanto-Ligo, kaj daŭrigis la traktado kun SAT kaj la presejoj pri la baldaŭa produkto kaj dissendo de PIV 2020.

Kaj ĉefe, krom la pacienco mi devis lerni (kaj ankoraŭ lernas, ĉar mi skribas tion en rekapabliga hospitalo, kie mi ankoraŭ konvaleskos ĝis nun nekonata tempo) ankaŭ humilecon. Nur nun vundita mi ekkomprenis, ke mi estis en mia egoo tro fiera pri miaj fizikaj kapabloj, post kiam mi sukcesis per vigla ekzercado kaj ĉiutaga moviĝo (matena gimnastikado, paŝado – ĉi-jare jam ĉiutage min. 10 000 paŝojn – al tio regula naĝado kaj tabloteniso) senti min same fizike forta kiel antaŭ la sukcesa sed malagrabla kuracado de kancero, kiu febligis min tiugrade, ke mi ne povis senripoze eĉ supreniri la ŝtuparon al mia loĝejo.

Mi do danke akceptas tiun lecionon de humileco kaj ekkomprenas, ke mi estas normala maljunulo, kiu dum siaj aktivaĵoj devas konsideri la objektivajn limojn pro aĝo, inter ili ankaŭ pli malrapidan reakcion kaj multe pli facilan rompiĝemon de la ostoj ol dum la juneco.
Kaj kial mi skribas tion? Ĉar laŭ mia sperto negativaj ekzemploj estas pli bone rememoreblaj ol pozitivaj, mi volas per mia ekzemplo averti la legantojn: Estu singardemaj, ĉar vere momento de malatento povas subite kaj tre serioze ŝanĝi vian vivon!
Bonvolu ne sekvi mian ekzemplon!

Petro Chrdle - verkite por Starto
ilustraĵoj de la humuristo Pavel Rak

Vi estas mia heroo: libro de UN pri COVID-19 aperis en Esperanto

Ĉina Esperanto-Ligo, Universala Esperanto-Asocio kaj UNESKO (La Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj) partoprenis en esperantigo kaj eldono de la multlingva bildlibro *Vi estas mia heroo* pri la tutmonda batalo kontraŭ COVID-19. Nun la libro en Esperanto kaj aliaj pli ol kvindeko lingvoj legeblas en la retejo de Inter-Agenteja Konstanta Komitato de UN (Unuiĝintaj Nacioj).

La libro taŭgas por geknaboj, kiuj aĝas inter ses kaj dek unu jaroj. Per la vojaĝo de la knabino Sara kaj la mirakla besto Ario la libro celas diskonigi al infanoj kiel protekti sin mem, familianojn kaj amikojn kontraŭ infektiĝo de COVID-19 kaj kiel trakti negativan humoron.

La libro *Vi estas mia heroo* estas lanĉita de Inter-Agenteja Konstanta Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subten-Konsila Grupo en Kriza Situacio kaj kune eldonita de pli ol 50 organizoj inkluzive de la Monda Organizo pri Sano kaj la Infana Fonduso de UN.

La Esperanta versio estas tradukita de la rusa esperantisto Andrej Peĉonkin.
Bonvolu elŝuti kaj legi la libron en Esperanto.
La libro en aliaj lingvoj.
Redaktoro: Gao Shuyuan
Fonto: El Popola Ĉinio

Esperantistoj dum kaj post la kriza stato:

Benešov

Anoj de la E-klubo en Benešov kunvenis jam duan fojon antaŭ la loĝejo de unu el niaj aninoj, babilis pri diversaj aferoj kaj kompreneble ankaŭ praktikis Esperanton.

L. Chaloupková

Ludoj en Suda Bohemio

Membroj de la grupo E-mental' renkontiĝis jam la dudekan fojon en la lasta junia semajnfino en la kabano de geedzoj Tomeček en Chotýčany ĉe České Budějovice. Dek ses partoprenantoj konkursis en tradukado de novaj strangaj esprimoj rilate al epidemio en Esperanton kaj aktoris en teatraj scenetoj pri la temo: Kiel E-mental' superis KRON-VIRUSOn.

Parto de la ludo estis konkurso pri la plej bela masko.

Ĉiun vesperon ni gustumis specialaĵojn preparitajn sur bivakfajro kaj ĉefe ni ripozis en belega naturo. Ni nur bedaŭris, ke en proksimaj arbaroj furiozas skolitoj kaj multe da arboj estis faligitaj. Ankaŭ la arbara puteto jam ne havas akvon pro la granda sekeco, do ni devis kunporti trinkeblan akvon.

Ni jam ĝojatendas komunan turistan konadon de italaj belaĵoj aŭtune de tiu ĉi jaro.

L. Angelová

Renkontiĝo en la E-klubo Amikeco de Č. Třebová

Okaze de la 60-a datreveno de la fondiĝo de la Esperanto-klubo en Česká Třebová realiĝis E-renkontiĝo la 27. 6. 2020. Partoprenis 33 esperantistoj el 12 urboj kaj unu viro el Pollando, kiu laboras en la urbo Č.T. La ĉeestantoj unue vizitis la urban muzeon, kie estas ekspozicio de ***Veloreksoj***, poste promenadis al la urba parko Javorka por la E-memorŝtono. Tie samideano L. Kovář parolis pri la renkontiĝo antaŭ dek jaroj, kiam la ŝtono estis inaŭgurita okaze de la 50-a datreveno de la Esperanto-klubo.

La programo daŭris en la Nacia domo per serio de rememoroj pri la agado de EK, ankaŭ en kunlaboro kun aliaj kluboj. La rememoroj estis buntigitaj de gajaj travivaĵoj kun eksterlandanoj, kiuj vizitadis la klubon. Ekinteresis ankaŭ rememoroj pri regulaj dancbaloj kaj Silvestroj, kiujn partoprenis ankaŭ multaj

ĉi-tie ĉeestantaj. La reprezentantoj de la kluboj ricevis kiel dankon pro la bona kunlaboro etan dolĉan premion.

La prezidantino de ĈEA L. Hýblová parolis pri planoj de laboro en la asocio kaj Libuše Dvořáková pri la E-muzeo Svitavy.

Regis bona kontento kaj ridetoj super la rememoroj.



J. Křížková

Trista anonco:

La 24-an de majo forpasis **Victor Sadler** (*1937), brita - nederlanda esperantisto, multjara direktoro de UEA kaj akademiano, redaktoro de la revuo *Esperanto*, poeto, lingvisto.

Honoron al lia memoro!

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.